

informilo por interlingvistoj



Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj

24-a jaro (tria serio)

ISSN 1385-2191

n-ro 94-95 (3-4/2015)

Enhavo

| | | |
|---------|--|----|
| 1 | Pasintaj konferencoj..... | 2 |
| 1.1 | Pri „Jan Baudouin de Courtenay kaj interlingvistiko“ en Tajpeo/Tajvano..... | 2 |
| 1.2 | „Polyglot Gathering“ 2015 en Berlino (Judith Meyer)..... | 2 |
| 1.3 | Unua Monda Kongreso pri Lingvaj Rajtoj (Davide Astori, Michele Gazzola, Federico Gobbo) ... | 3 |
| 1.4 | UEA en la 55-a Internacia Kongreso de Amerikanistoj (Maritza Gutiérrez Gonzáles) | 6 |
| 1.5 | „Workshop on Lingua Francas“ en Leipzig..... | 7 |
| 1.6 | 25-a Konferenco de GIL 2015: Planlingvoj – praktikaj aspektoj..... | 7 |
| 1.7 | Internacia Ido-Renkonto en Berlino | 8 |
| 2 | El Universitatoj kaj Altlernejoj..... | 8 |
| 2.1 | Interlingvistiko kaj Esperanto en ukraina universitato (Nina Danylyuk) | 8 |
| 2.2 | Studsiesio en Poznano dum septembro 2015 (Ilona Koutny) | 9 |
| 2.3 | Esplorgrupo „Ekonomio kaj Lingvo“ ĉe Humboldt-Universitato Berlino | 10 |
| 2.4 | Universitataj laboraĵoj | 10 |
| 2.4.1 | <i>Ethan G. Wilcox</i> : Bakalaŭra studo pri la sovetia Esperanto-movado | 10 |
| 2.4.2 | Magistraj laboraĵoj..... | 11 |
| 2.4.2.1 | <i>Irene Caligaris</i> pri la identecoj de esperantistoj..... | 11 |
| 2.4.2.2 | <i>Eva N. Zaki</i> pri Esperanto kaj ĝia lingvo-komunumo | 11 |
| 2.4.3 | <i>Angela J. Tellier</i> : Doktoriga disertacio pri metalingva konscio kaj lerno de lingvoj..... | 11 |
| 3 | Scienco kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lille | 12 |
| 3.1 | Kongresa temo: “Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj | 12 |
| 3.2 | Internacia Kongresa Universitato | 12 |
| 3.3 | Faka aranĝo de ISAE | 13 |
| 3.4 | Kleriga lundo | 13 |
| 3.5 | Tago de la Lernejo..... | 13 |
| 3.6 | Esperantologia Konferenco..... | 14 |
| 3.7 | Kunsidoj de CED kaj ESF | 15 |
| 4 | Novaj gravaj publikaĵoj | 15 |
| 4.1 | <i>Michael Gordin</i> : Scientific Babel | 15 |
| 4.2 | <i>Roberto Garvía</i> : Esperanto and its Rivals | 15 |
| 4.3 | INDECS: “The Phenomenon of Esperanto” | 16 |
| 4.4 | Enciklopedie: Historioj de Esperanto-Literaturo (<i>Sutton kaj Minnaja/Silfer</i>) | 17 |
| 4.5 | <i>Aleksander Melnikov</i> : Manlibro de la Esperanto-Kulturo | 18 |
| 4.6 | <i>Hermann M. Ölberg</i> pri Interlingvistiko kaj Esperantologio..... | 19 |
| 4.7 | Interlingvo inter lingvoj | 19 |
| 4.8 | KAEST 2014 pri arkivoj kaj bibliotekoj | 20 |
| 4.9 | <i>Esperantologio – Kajero 7</i> | 21 |
| 4.10 | Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco (2013)..... | 22 |
| 4.11 | <i>Language. Communication. Information</i> (AMU, Poznano) | 23 |
| 4.12 | Festlibro por <i>Tamás Gecső</i> | 23 |
| 4.13 | Sociologia analizo pri UEA | 24 |
| 4.14 | Aktoj de la 24-a GIL-Konferenco 2014: La planlingva movado ĉirkaŭ la 1-a Mondmilito | 24 |
| 5 | Interlingvistiko en vortaroj ĉe <i>de Gruyter</i> (Cyril Brosch)..... | 25 |
| 6 | Eldonaĵoj de la Cifal Volapüka <i>Hermann Philipps</i> | 26 |
| 7 | Aktuala Bibliografio 7 | 23 |
| 8 | La japana (inter)lingvisto <i>Gotoo Hitosi</i> – 60-jara | 35 |
| 9 | La eldonoj “Impeto” kaj ĝiaj forpasintaj gvidantoj (Dima Ševĉenko) | 37 |
| 10 | <i>Bernhard Pabst</i> : Bibliografio de Esperanto-vortaroj..... | 40 |
| 11 | <i>Árpád Máthé</i> (1936-2015) | 40 |

1 Pasintaj konferencoj

1.1 Pri „Jan Baudouin de Courtenay kaj interlingvistiko“ en Tajpeo/Tajvano

La 24-an kaj 25-an de oktobro 2015 en la Universitato de Tajvano en Tajpeo okazis la 5-a Internacia Simpozio pri eŭropaj lingvoj en Orienta Azio. Kadre de la simpozio *prof. Valerij Gretchko* de la Universitato de Tokio, prelegis pri la klopodoj de *Jan Baudouin de Courtenay* pri interlingvistiko. (Laŭ informo de *Maria Gabriela Schmidt*, ricevita de *Ulrich Lins*)

1.2 “Polyglot Gathering”, 1-a ĝis 4-a de majo 2015 en Berlino

Historio

La *Polyglot Gathering* estas ĉiujara superfaka kunveno de plurlingvuloj kaj lingvemuloj, kiuj plejparte jam konas unu la alian pro interreta kontakto.

La unua iom granda renkontiĝo de tiu komunumo estis la *Polyglot Conference 2013* en Budapeŝto, kiu allogis 120 partoprenantojn dum du tagoj. Bazante sin je tiu sperto, *Judith Meyer*, *Chuck Smith* kaj *Martin Sawitzki* (ĉiuj esperantistoj) decidis okazigi pli longan kaj grandan (laŭ kvanto de partoprenantoj) eventon en la posta jaro. La fokuso ne plu estus nur sur la prelega programo sed ankaŭ sur la internacia sperto-interŝanĝo inter la partoprenantoj. La ŝablono por tio estis la Esperanto-aranĝoj Internacia Junulara Kongreso kaj Internacia Seminario. La organizantoj ankaŭ kopiis plurajn kulturajn ecojn de tiuj kongresoj, ekzemple la aligatorejon, la gufujon kaj la internacian kulinaran festivalon.

La *unuan Polyglot Gathering*, kiu okazis en junio 2014 en Berlino, partoprenis 231 homoj el 35 landoj. La *duan Polyglot Gathering*, kiu ĵus okazis (1-4 Majo 2015), partoprenis 344 homoj el 52 landoj, inter tiuj ankaŭ partoprenintoj el Usono, Kanada, Brazilo, Ĉinio, Japanio, Koreio, Novzelando, Israelo, Libano, Irano kaj Kazahio. Ambaŭ fojojn la eventoj estis elvenditaj.

Organizantoj kaj sponsoroj

Krom la tri leĝe kaj finance respondecaj organizantoj *Judith Meyer*, *Chuck Smith* kaj *Martin Sawitzki*, pli granda teamo el 15 volontuloj respondecis pri diversaj partoj de la konferenco. Aldone troviĝis sennombraj surlokaj helpantoj kaj filmoteamo de FilmArche e.V., kiu nun preparas ĉiujn filmitajn prelegojn por ebligi postan spektadon interrete.

La oficiala sponsoro de la konferenco ĉijare estis *italki.com*, la plej granda interreta bazaro por lingvoinstruistoj kaj lingvolernantoj. Cetere estis sponsoroj multaj konataj firmaoj el la lingvolerna mondo, inter aliaj la eldonejoj *Assimil* kaj *Hodder* (“Teach Yourself” lingvokursoj), la populara enreta lingvokursejo *Duolingo* kaj la lingvoenciklopedio *Omniglot*. Ankaŭ la esperantista organizo E@I estis sponsoro kaj havis standon ĉe la librofoiro. Kompleta listo de sponsoroj troviĝas en <http://polyglotberlin.com/sponsors/>.

Programo

La programo de la Polyglot Gathering inkluzivis entute 78 prelegojn, lingvokursetojn kaj diskutojn. Ili distribuiĝis je kvar tagoj, ĉiam de la 9-a horo ĝis la 1-a kaj de la 3-a posttagmeze ĝis la 6-a. En ĉiu momento okazis tri programeroj. La plejmulto de la prelegoj estis en la angla, kvankam ĝenerale ĉiuj lingvoj permesitis kaj kelkaj prelegantoj daŭre ŝanĝadis lingvojn. Po unu prelego estis en Esperanto kaj en la kataluna. La preleg-programo apartenis al kvar kategorioj:

- 1 Konsiloj pri lingvolernado. Tre popularis la prelegoj de *Richard Simcott* kaj *Alex Rawlings*, kiuj jam intervjuiĝis de BBC kaj Forbes pro sia elstara multlingveco, la prelego de la usona filmaktoro *Michael Levi Harris* (“The Hyperglot”), kiu montris kiel aktoroj trejnadas por havi bonajn akĉentojn, kaj la prelego de *Tim Keeley* pri sociaj, psikologiaj kaj afektivaj faktoroj en lernado de multaj lingvoj.

- 2 Prelegoj el lingvistiko, ekzemple *Brian Loo* “Native Languages of North America”, *Ed Robertson* “Etruscan and the Joys of Trümmersprachen”, *Marcus Zanteré* “Japanese Role Language ‘Yakuwarigo’” kaj la prelego de *Gareth Popkins* pri kolordistingoj kaj kolorvortoj en diversaj lingvoj.
- 3 Programeroj por elekto de profesio aŭ profesia pliboniĝo de poliglotoj, ekzemple *Benny Lewis* (aŭtoro de la furore vendata libro “Fluent in 3 Months” kiu listiĝis en New York Times) donis konsilojn pri memmerkato kiel blogisto kaj aŭtoro, *Ruslan Kokorin* eksplikis la kreadon de klientolisto kiel lingvoinstruisto kaj *Lýdia Machová* gvidis atelieron pri simultana interpretado.
- 4 Lingvokursetoj pri malofte lernataj lingvoj, i. a. la indonezia, irlanda, nordsama, navaja, skotsa, slovaka kaj tamila.

Aldone organiziĝis vespera programo: la unuan vesperon okazis librofoiro kaj internacia kulinara festivalo, la duan vesperon kvizludo, la trian vesperon koncerto de jOmO en 25 lingvoj kaj la lastan vesperon kulturaj prezentaĵoj el multaj landoj. La kompleta programo videblas en <http://polyglotberlin.com/programme/>. Videosurbendigoj de la prelegoj enretas ekde aŭgusto.

Planlingvoj

Esperanto estis la plej ofta planlingvo. 83 el la 344 ĉijaraj partoprenantoj indikis en la aliĝilo, ke ili povas kompreni prelegojn en Esperanto. Fakte pli ol 120 partoprenantoj aŭskultis la prelegon de *André Müller* pri tonaj lingvoj “en facila Esperanto”. Inter ili multaj poste miris kiom ili sukcesis kompreni.

Por la ĉijara konferenco krome registriĝis 19 parolantoj de *Tokipono* – certe rezulte de tio ke *Sonja Lange*, la inventisto de tiu lingvo, ofertis kurseton pri la lingvo je la pasintjara konferenco kaj vendis lernolibrojn.

Almenaŭ du partoprenantoj scipovis *Klingonon* – ili prezentis kantojn en Klingono dum la kultura vespero. Ankaŭ ĉeestis iuj parolantoj de *Lojvano*, *Quenya* kaj *Interlingua*, sed tiuj ne sin prezentis.

Planoj

Pro la granda sukceso de la konferenco certas ke ankaŭ venontjare okazos *Polyglot Gathering*, sed la datoj kaj loko ankoraŭ ne certas.

(*Judith Meyer*, yutian.mei@gmail.com)

1.3 Unua Monda Kongreso pri Lingvaj Rajtoj

De 19-a ĝis 23-a de majo 2015 en la Universitato de Teramo, Italio, okazis la unua Monda Kongreso pri Lingvaj Rajtoj (1-a MKLR).

Temo

La *Manifesto de Ĝerono pri lingvaj rajtoj* memorigis, ke lingvaj rajtoj devas esti konsiderataj kiel fundamentaj homaj rajtoj. Sekve, oni devas ilin studi, prezenti kaj defendi kiel esencan parton de la homa vivo. La celo de la unua monda kongreso pri lingvaj rajtoj estis kunvenigi kaj dialogigi fakulojn, kiuj diskutis la temon de lingvaj rajtoj el malsamaj vidpunktoj, ekzemple, laŭ la aliro de juro, lingvistiko, ekonomiko, sociologio, politikaj sciencoj.

La ĝenerala temo de la kongreso estis “*lingvaj rajtoj: reprezentoj, ideologioj kaj lingvaj politikoj. Kiuj rilatoj kaj kiuj intervenoj?*”. La partoprenintoj estis invitataj diskuti la reprezentojn pri lingvaj rajtoj, la influon de ideologio sur tiuj reprezentoj kaj iliajn praktikajn implicojn por lingva politiko. La kongreso bonvenigis partoprenantojn ekster la akademia mondo. Sufiĉe da spaco estis donita al asocioj kaj reprezentantoj pri lingvaj minoritatoj, politikistoj kaj artistoj.

La ĝeneralaj temoj, kiujn la organizantoj indikis en la alvoko al prelegproponoj, estis:

1. Lingva suvereneco aŭ lingva malkomforto? De la individuo al la socio.

2. Reprezentoj de la identecoj en multlingva kunteksto: kial kaj kie interveni?
3. Juro kaj lingvo: lingva identeco kaj jura identeco.
4. Manko aŭ malobservo de la rajtoj de minoritatoj aŭ nevideblaj grupoj.
5. Lingvaj rajtoj vidalvide al la lingvaj hegemonioj.
6. Defioj kaj agantoj de lingva agnosko.

Organizintoj kaj subtenintoj

La unua MKLR estis la rezulto de la kunokazigo de tri tradicie apartaj kunvenoj, t.e. la 14-a internacia konferenco de la Internacia Akademio de Lingva Juro organizita de la menciita akademio, la 9-aj Tagoj de lingvaj rajtoj kaj la tria salono de lingva diverseco, kiujn organizas la Universitato de Teramo kune kun la Asocio "LEM-Italio" (Lingvoj de Eŭropo kaj Mediteraneo) kaj kun la Studocentro pri lingva diverseco. Pli ol tridek organizaĵoj aŭ asocioj patronis aŭ subtenis (finance aŭ morale) la kongreson.

La ĉefaj surlokaj organizantoj de la kongreso estis *Giovanni Agresti* kaj *Renata de Ruggeriis* el la Universitato de Teramo kaj la Asocio LEM-Italia.

Partoprenintoj

En la kongreso partoprenis pli ol 100 homoj el ĉirkaŭ 30 landoj, ĉefe el Eŭropo kaj Norda Ameriko. Temis efektive pri partoprenintoj el pluraj fakoj, inkluzive sociolingvistiko, juro, ekonomiko kaj politikaj sciencoj. Partoprenis ankaŭ pluraj reprezentantoj de asocioj, kiuj agas por la protektado de lingvaj rajtoj kaj kontraŭ lingva diskriminacio. Sekve, temis pri bunta kongreso, kies publiko kaj kontribuintoj ne estis nur akademianoj.

Programo

La programo estis vasta kaj riĉa. La kongreso daŭris kvin plenajn tagojn de la 9-a al la 19-a horo, kaj pluraj publikaj debatoj aŭ prezentoj estis organizataj vespere post la fino de la labortago. La listo de la prezentoj estas tro longa kaj ne eblas ĝin kopii ĉi tie. Sufiĉas rememorigi la ĝeneralajn invititajn fakajn prelegojn, t.e:

Joseph Lo Bianco (University of Melbourne, Australio): „Peacebuilding and language rights in the three conflict-affected settings in SE Asia“.

Bruno Maurer (Université Montpellier 3, Francio): „Les représentations sociales de langue et identité en contexte multilingue“.

Santi Perera; Pilar Monreal; Josep M^a Nadal; Francesc Feliu; Gemma Albiol (Universitat de Girona, Hispanio): „Representacions socials i llengua: la imatge social de la llengua catalana“.

Theodorus Du Plessis (University of the Free State, Bloemfontein, Sudafriko): “Comparing language laws from a sociolinguistic point of view. The South African Languages Bill, 2003 versus the Use of Official Languages Act, 2012“.

Ning Ye (Centre for Police Discourse and Behaviour Research, Zhejiang Police College, Ĉinio): „Approaches to “ordinary residence”: a sociosemiotic construction“.

Gabriele Iannàccaro (Universitet Stockholm, Svedio) kaj *Vittorio Dell'Aquila* (Centre d'Etudes Linguistiques pour l'Europe, Milano, Italio): „Conoscere per ben operare: la valutazione della vitalità linguistica in vista di azioni di sostegno e recupero“.

Michel Doucet (Observatoire international des droits linguistiques, Université de Moncton, Kanado): „Regard sur les droits linguistiques: l'importance du territoire vs le respect de la règle de droit“.

Jean-François Baldi (Délégation générale à la langue française et aux langues de France, Francio): “Langue française, langues de France: deux droits, une politique?“

Vincenzo Pepe (Seconda Università degli Studi di Napoli, Italio): „Biodiversità culturale, diritti linguistici e identità“.

Esperanto estis la temo de du fakaj prelegoj, t.e:

Federico Gobbo (Universiteit van Amsterdam, Nederlando) kaj *Emanuele Miola* (Università de Milano-Bicocca, Italio): „Modificare la rappresentazione linguistica: piemontese ed esperanto a confronto“

La prelego prezentis socilingvistikan komparon inter Esperanto kaj la piemonta, t.e. minoritata lingvo sen oficiala rekono parolata en Piedmonte, itala regiono kies ĉefa urbo estas Torino. La uzo de la bitteknologioj por disvastigi kaj subteni Esperanton povas iĝi modelo por minoritataj lingvoj kiel la piemonta. Fakte minoritataj lingvoj kiel la piedmonta devas iĝi mojosaj por la pli junaj generacioj kaj por tion fari ili devas ŝanĝi la retorikon de la nostalgio de la pasintaj tempoj al nova difino, malpli teritoria, de piemonteco. Pro tio Esperanto, estante lingvo sen teritorio, povas iĝi modelo. Lumbildoj estis trilingvaj: en la itala, la piemonta kaj Esperanto. Prezentis la prelegon *Federico Gobbo*. La prelego reflektas la agadon kaj de la Amsterdama katedro de Interlingvistiko kaj Esperanto kaj de la EU-projekto “MIME” (“Movebleco kaj Inkluziveco en Multlingva Eŭropo”, vd. 1.5). La preleganto dankas al UEA kaj MIME por la subteno.

Davide Astori (Università di Parma, Italio): „Definire una minoranza socio-linguistica: dalle lingue segnate a quelle pianificate“.

La prelego prezentis socilingvistikan komparon inter Esperanto kaj la itala gestolingvo (LIS), kiu estas uzata ĉefe de surduloj disde Italio sed sen oficiala rekono. La identeco de la esperanta kvazaŭ-popolo iel similas per kelkaj societaj trajtoj al la komunumo de la surduloj, kiuj havas – kiel la esperantistoj – la plenan konscion de aparteno al specifa kulturo, kun propraj referencvaloroj, kunvenejoj, literatura produktado, ĉiuj kuntenata, kvazaŭ gluo soci-lingva, per la lingvo mem, samtempe kaŭzo de identeco kaj produkto de la tradicio de komunumo. La prezentita interpretativa modelo rekonas en la surdeco – kaj sekve ankaŭ, paralele, en la esperantistaro – etno-lingvan minoritaton kaj enkadrigas la studojn, al ĝi rilatajn, en la pli larĝa kunteksto de plurlingvismo kaj de la minoritataj kulturoj.

Esperanto estis ankaŭ centra temo de vespera publika debato inter *Giorgio Pagano*, sekretario de “Esperanto” Radikala Asocio (ERA), kaj *Christian Tremblay*, direktoro de la Observatoire européen du plurilinguisme (eŭropa centro pri multlingveco).

La programo inkludis du prelegojn de homoj, kiuj aktivas en la Esperanto-movado, t.e.:

Massimo Ripani (Redaktoro de “Tejo Tutmonde”, Rusio): „Lingue e politiche della Federazione Russa“.

La prelego estis prezentita kune kun *Dimitrij Evseev*, ĵurnalisto de la Ĉuvaŝa Respubliko. *Ripani* agis ĉefe kiel interpretisto. La temo estis superrigardo pri la lingvopolitikoj en la Rusa Federacio post la disfalo de Sovet-Unio kun komparo pri diversaj specifaj situacioj.

Michele Gazzola (Humboldt-Universität zu Berlin, Berlino, Germanio): „Multilingualism and linguistic justice in the European Union“

Michele Gazzola prezentis la lastajn rezultojn de la ĵus finiĝinta projekto “LAPO” (“Lingva justeco kaj lingva politiko en Eŭropa Unio”). La rezultoj montras, ke la multlingva lingva politiko de EU estas ne nur multe pli efika ol nurangla aŭ trilingva (angla-franca-germana) lingva politiko; ĝi estas ankaŭ multe pli justa, ĉar ĝi permesas pli altan inkluzivon de tiuj EU civitanoj, kiuj apartenas al la plej malavantaĝaj grupoj de la socio kaj havas, ĝenerale, malaltajn kompetencojn en fremdaj lingvoj. La unuaj rezultoj de la projekto estas parte haveblaj en Esperanto.¹

Lingva reĝimo

La kunveno estis multlingva. Oni akceptis prelegproponojn en la sekvaj lingvoj: angla, franca, hispana kaj itala. La laborlingvoj de la kongreso estis la franca, itala kaj angla.

¹ Lingva justeco: kiel taksu ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio”, en Vergara, José-Antonio (red., 2014), Aktoj de la 67a Sesio de la Internacia Kongresa Universitato, 2014 en Buenos Aires. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, pp. 74-89, (2014).

Dum la kongreso oni provizis interpretadon en la tri laborlingvoj kaj en la itala signolingvo (LIS). La plejmulto de la partoprenintoj elektis la francan kaj la italan kiel laborlingvojn. Esperanto-parolantoj estis ĉirkaŭ 4% de la partoprenintaro.

La oficiala programo de la kunveno estas publikigita ĉe:

<http://www.associazionelemitalia.org/le-nostre-azioni/giornate-dei-diritti-linguistici/cmdl-2015.html> .

La aktoj de la kongreso estos publikigataj en 2016.

(Redaktis: *Davide Astori, Michele Gazzola, Federico Gobbo*)²

1.4 UEA en la 55-a Internacia Kongreso de Amerikanistoj

De la 12-a ĝis la 17-a de julio 2015 en Salvadoro (Respubliko Salvadoro) okazis la 55-a Internacia Kongreso de Amerikanistoj (ICA) pri la temo „konflikto, paco kaj identeco-konstruo en La Amerikoj“.

La 55 ICA sesiis en la universitato Francisco Gavidia (UFG) de Salvadoro, kie ariĝis pli ol 2000 specialistoj el pli ol 20 landoj.

Danke al kunordigo de la *doktoro Iván Deance*, de la Distingita Universitato Aŭtonoma de Puebla, Meksiko, kaj de *Martín Schäffer* flanke de UEA, estis aranĝita la simpozio 176 en la fako Arto kaj Kultura Heredaĵo sub la temo „Memoro, bildo kaj identeco en Ameriko: versioj kaj konvertiĝoj“.

Nome de la Amerika Komisiono de UEA kaj danke al ties financa subteno kaj tre speciale de ESF mi partoprenis tiun ĉi kongreson kiel preleganto nome de UEA.

Mia proponita temo „La identeco en interkultura kunteksto: lingva alternativo ekde propedeŭtika enfokusiĝo“ estis prezentita en la simpozio 176 la 15-an de julio kun partopreno de specialistoj el diversaj fakoj kaj landoj.

La Internacia Kongreso de Amerikanistoj estas scienca evento de longa tradicio, ĉar ĝi sinsekve okazas ekde 1875, kiam la unua kongreso sesiis en la franca urbo Nancy kunvokita de la Amerika Societo de Francio kun la celo “kontribui al progreso de studoj etnografiaj, lingvaj kaj historiaj rilate al la du Amerikoj”.

Dum la unuaj dek kongresoj la sidejo estis en Eŭropo, kaj Meksiko estis la unua amerika sidejo en 1895. De tiam, ĝi okazas alterne en Eŭropo kaj Ameriko.

Nuntempe ĝi ampleksas aliajn fakojn kiel antropologion, arkeologion, arton, juron, ekonomion, edukadon, filozofion, lingvistikon, literaturon, sociologion, geografion, urbanismon, kaj aliajn plus aldonaj fakoj tradicie ligitaj al la agadkampoj scienca kaj teknologia.

La kongreso okazas ĉiun trian jaron kun granda nombro da partoprenantoj kaj varia programo scienca kaj kultura, simpozioj, rondaj tabloj, prelegoj, laborkunsidoj de asocioj kaj organizoj internaciaj aliĝintaj al la amerikanismo.

Dum la kongreso okazis pli ol 200 simpozioj plus 5 magistras prelegoj, rondaj tabloj, libroprezentado, koncertoj kaj ekskursaj programoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj kiuj ebligis mian partoprenon en tiel prestiĝa internacia evento eksterasocia, kie mi reprezentis UEA-an kaj ties Amerikan Komisionon en scienca kaj faka medio en la kontinento.

Resumo de la prelego:

Mi prezentis alproksimiĝan analizon de la konstruo de kolektiva identeco en komunumo teritorie disa, sed ligita per komuna lingvo, kaj ni same proksimiĝas al la rolo de tiu lingvo en tiu ĉi procezo. Surbaze de la koncepto ke la graveco de la lingvo en la procezo konstrui kolektivitan identecon ne estas fenomeno kategoria nek universala, sed obeema al socia konstruo, kiu transformas la lingvon en esprimon kaj vehiklon de la aparteno al kolektivo,

² *Davide Astori kaj Michele Gazzola* dankas al ESF (pere de la CED-fonduso) pro malavara subteno.

evidentiĝas ke efektive, la lingvo internacia Esperanto grave rolas tiel en la formado kiel en la konstruado de identeco de internacia komunumo, interalie, pro ĝia elpruvita propedeŭtika valoro kiu faciligas la interkulturajn procezojn, kaj sekve, rekonon al la alieco, la protekton de la gepatra lingvo kaj sekve la kolektivajn identecon.

La hispana estis la lingvo de la konferenco. Ĉiuj prezentoj okazis en la hispana, eĉ de britaj kaj usonaj fakuloj kiuj ĉeestis la konferencon. Mi tre ĝojas ke tia spaco en universitataj medioj povis realiĝi kaj eĉ en la kongresa libro kaj en KD restas dokumenta pruvo pri tio.

Lic. Maritza Gutiérrez González.

(Kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA. Ekonomikisto; radio-ĵurnalistino; tradukisto; instruistino de la Hispana Lingvo kiel fremda lingvo).

1.5 „Workshop on Lingua Francas“ en Leipzig/Germanio



La 26-an de oktobro 2015 en la Universitato de Leipzig (Instituto por Anglistiko) okazis **Workshop on Lingua Francas**.

La aranĝo okazis en la kadro de la projekto MIMÉ (Mobility and Inclusion in Multilingual Europe), subtenata de Eŭropa Unio.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

Virginie Mamadouh (Universitato de Amsterdam): “A lingua franca for academic activism? The use of English (and Dutch) in 'Rethink”

Mark Fettes (Simon Fraser University Burnaby, Canada): “Educational inclusion, inside and outside schools: Some challenges for language policy and planning”

Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig): “Lingua Franca communication in English and Esperanto: Code-switching”

Cyril Brosch (Universitato de Leipzig): “Attitudes towards foreign accents in English as a Lingua Franca and Esperanto”

Final discussion.

1.6 25-a Konferenco de GIL 2015: Planlingvoj – praktikaj aspektoj

La tradicia jara konferenco de la germana *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (GIL) (Societo pri Interlingvistiko) okazis de 13-a ĝis 15-a de novembro 2015 en Berlino. Ĝi estis la 25-a konferenco de la jam tradicia scienca organizaĵo. Ĝin partoprenis 38 personoj,

Oni prezentis jenajn prelegojn, tamen en la germana:

Chuck Smith (Berlino): Duolingo

Rudolf Fischer (Nordwalde), prezentis Cyril Brosch: Kurantaj postuloj al esperanto-lernolibro por germanlingvuloj

Cyril Brosch (Leipzig): Esperanto en la buŝo de ne-esperantistoj

Anna-Maria Meyer (Bamberg): Slavaj planlingvoj

Kunoslav Puškar/Velimir Piškorec (Zagreb): Germanaj leksikaj modeloj en Esperanto

Sabine Fiedler (Leipzig): “...a slim core of Esperanto roots (...) and a huge periphery of (English) borrowings” – ĉu minacas la angliĝo de Esperanto”?

Franz Januschek (Oldenburg): Junaj lingvo-inventantoj

Detlev Blanke (Berlin): Prezento de aktuala interlingvistika literaturo

Roland Schnell (Berlin): Militpropagando per Esperanto – La “Internacia Bulteno” de 1914-1918 prezentas en la eksterlando la germanan vidpunkton.

Sabine Fiedler/Cyril Brosch/Bengt-Arne Wickström: Mobility and Inclusion in Multilingual Europe (MIME) – Unuaj rezultoj.

Krom tio okazis diskuta programero pri Esperanto-lerniloj kaj moderna didaktiko.

Johann Pachter ofertis librojn. *Sebastian Kirf* vidbende registris la prelegojn.

La 26-a GIL-konferenco en 2016 (11.-13.11.) okazos denove en Berlin. Informojn donas la prezidantino de GIL prof. d-ro Sabine Fiedler:

sfiedler@uni-leipzig.de. Ankaŭ vidu www.interlinguistik-gil.de

1.7 Internacia Ido-Renkcontro en Berlin

La ĉi-jara *Internacia Ido-Renkcontro* de 24-a ĝis 31-a de aŭgusto 2015 okazis en Berlin.

Ekster la programo (29.8.) *Detlev Blanke* prelegis pri lingvo-politiko en Eŭropa Unio. Li prelegis en la germana kaj samtempe per *PowerPoint* montris esperantlingvajn foliojn. La vigla diskuto okazis en Ido, Esperanto kaj la germana.

Dum la konferenco oni ankaŭ informis pri la nova ejo de la riĉa kaj valora Ido-arkivo, unu el tutmonde la plej ampleksaj.

Informojn donas (en la germana): Rudolf.Gensch@gmx.de

2 El Universitatoj kaj Altlernejoj

2.1 Interlingvistiko kaj Esperanto en ukraina universitato

La 3-an de aprilo 2015 en la ĉefa domo de *Lesja Ukrainka Orienteŭropa nacia universitato* ĉe la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko estis solene malfermita la unua universitata Centro de Esperanto en Ukrainio. Ĝin gvidas *prof. d-ro Nina Danylyuk*, romanisto.

La celoj de la Centro estas:

- 1) informi studentojn, aspirantojn, instruistojn k.a. pri la problemo de interkultura komunikado;
- 2) okazigi sciencajn rondajn tablojn, konferencojn kaj seminariojn, dediĉitajn al la menciita problemo
- 3) organizi internaciajn Esperanto-renkontiĝojn kaj vesperojn de internacia amikeco.
- 4) okazigi la kunsidojn de la Esperanto-klubo “Arbara kanto”.

En la Centro jam okazis:

- 1) prelegoj de specialigita kurso “Ĉefaj aspektoj de interlingvistiko” (3.04 –28.05. 2015);
- 2) ronda tablo kun magistriĝantoj kaj studentoj, dum kiu ni priparolis la problemon de internacia komunikado kaj artefaritaj lingvoj (29.05.2015);
- 3) tri kunsidoj de la Esperanto-klubo “Arbara kanto” (3.04, 16.04, 28.05);
- 4) renkontiĝo kun la estro de la firmao “AU-Pair-kontakt” *Manfred Kirsch* (Germanio) (16.04.15).

La katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko kaj la Esperanto-centro okazigis la 7.10. 2015 **rondan tablon pri “Funkciado de la internacia lingvo Esperanto kaj ĝiaj studoj”**. Partoprenis la vicprezidanto de UEA, *Stefan MacGill*, estro de la societo pri la defendo de la ukraina kulturo *Mikaelo Lineckij*, vicprezidanto de ukraina sekcio de ILEI *Oleksandr Hriščenko* (ambaŭ el Kijivo), la prezidanto de la Lucjka E-klubo “Arbara kanto” *Niko Vološin* kaj la instruistoj de Instituto pri eksterlanda filologio de la universitato kaj la studentoj.

Unue okazis renkontiĝo kun la dekanino *Oksana Rogach*, dum kiu estis traktitaj gravaj demandoj de fremdlingva instruado. Poste sekvis interparolo pri la samaj problemoj kun instruistoj de la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko kaj la estrino *Nina Danylyuk*. Post tio ĉiuj partoprenantoj pritraktis la problemon de internacia komunikado, lingvouzado kaj E-instruado kun la studentoj de la 2-a kaj la 4-a kurso. *Nina Danylyuk* informis pri sciencaj konferencoj en la ukrainaj universitatoj, dediĉitaj al la interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj, interlingvistiko kaj E, pri la E-centro, pri la esperantologia konferenco kaj E-instruado dum la UK en Lillo, pri E-staĝo en Grezijono kaj E-kursoj en Pluezek (Francio), en kiu ŝi partoprenis. *Stefan MacGill* parolis pri UEA kaj pri la sukcesa internacia programo AMO. *Oleksandr Hriščenko* montris la eblecojn de la reta E-instruado, *Mikaelo Lineckij* raportis pri lernado de E en la Kijiva liceo 38 kaj en la Parlamenta biblioteko. Ni planas ĉiujare organizi similajn rondajn tablojn post kiuj aperas novaj dezirantoj lerni E-n. Fine de la tago en la E-centro okazis kunveno de la loka E-klubo “Arbara kanto”, dum kiu la membroj ankaŭ parolis pri E-lernado kaj E-instruado. (Informo pri la vojaĝo de *Stefan MacGill* en en la urboj Kijivo, Lucjk kaj Lviv aperis en EKO 2015 44 UA).

(Laŭ informoj de *prof. d-ro Nina Danylyuk*)

La adreso por kontaktoj: Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato, Instituto pri Eksterlanda Filologio, Katedro pri Romanidaj Lingvoj kaj Interlingvistiko, Prospekt Voli 13, u. Luck, Ukrainio 43026

Retadreso: nina.danylyuk@gmail.com

2.2 Studsesio en Poznano dum septembro 2015

La interlingvistika studsesio, okazinta 19-25.09.2015, denove estis riĉa.

Marc Bavant (eksstudento de la Studoj) kun *Ilona Koutny* skizis la sintakson de esperanto, *Michael Farris* enkondukis la gestudentojn en leksikologion kaj semantikon.

Věra Barandovská-Frank daŭrigis la temon de planlingvoj kaj *István Ertl* prelegis pri la tria periodo de esperanta literaturo.

Alvenis ankaŭ *Aleksandr Melnikov* kaj prezentis sian Gvidlibron tra Esperantio, krome *Nicolau Dols*, kiu gvidis fonetikon antaŭ unu jaro, ĉi-foje li prelegis angle en la Lingvistika Instituto de AMU.

Post la merkredaj ekzamenoj okazis la komuna vespero kun poemoj kaj kantoj, tio donis eblecon renkontiĝi kun lokaj esperantistoj kaj aŭskulti Suzanan (*Zuzanna Kornicka*), kiu festis la eldonon de sia unua disko „Malsato de espero“. La semajnon partoprenis 20 gestudentoj el 10 landoj.

Ankaŭ kadre de Arkones, la tradicia internacia kultura aranĝo, okazis fakaj prelegoj:

Ĉi-foje prelegis *Věra Barandovská-Frank* (pri slavaj planlingvoj), *István Ertl* (pri Beletra Almanako, *Spritaj splitoj kaj preseraroj*), *Nicolau Dols* (pri la kulturo de Majorko). *Zbigniew Galor* analizis la problemojn el la libro verkita kun *Jukka Pietiläinen* „UEA en konscio de Esperantistoj“, *Aleksander Korĵenkov* (pri Kongresaj paroladoj), *Tomasz Chmielik* (pri la antaŭmilita juda mondo; li ankaŭ prezentis la novan „Historion de Esperanto-literaturo“ kaj

kun *István Ertl* la tradukitan poemvolumon de la pola nobelistino *Wisława Szymborska*) kaj *Michael Farris* (pri la anglalingva industrio).

El la kursanoj *Fernando Pita* prezentis libron pri la kulturo kaj lingvo de la tupioj, *Suso Moinhos* (la galegan literaturon), *Rafael Zerbetto* (la brazilan verkiston *Guimarães Rosa*), *Felix Jimenez Lobo* (malnovan retrovitan Eo-filmon), *Johano Derks* (eŭropajn falsajn amikojn) kaj *Michael Kozicki* (fervojjajn muzeojn). Speciala evento estis la prezento de la libro *Kiel dono de la mano*, poemoj de polaj poetoj, esperantigitaj fare de *Lidia Ligęza*, kun partopreno de poetoj kaj kunlaboro de kelkaj gestudentoj de la Studoj.

(Laŭ *Ilona Koutny*, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, UAM)

ESF plu subvencios

Pasintjare „Esperanto Studies Foundation“ (ESF) lanĉis la kampanjon “AMU Poznanon” por trovi aldonan financadon por Interlingvistikaj Studoj en Poznano (Pollando) ĉe la Universitato Adam Mickiewicz UAM, aŭ AMU.

ESF jam de jaroj subtenas la trijaran postdiploman programon en la prestiĝa kaj dua plej granda universitato de Pollando. La celo de AMU Poznanon estis kolekti, kun la helpo de esperantistoj, aldonajn 5 mil usonajn dolarojn por tiu unika programo. La pasintjara kampanjo estis sukcesa: ĝi atingis la deziratan celon dank’ al malavaraj kontribuoj de multaj esperantistoj. Ni ĝojas anonci, ke la ESF-estraro decidis daŭrigi AMU Poznanon ankaŭ por la studjaro 2015-2016, kun la sama ambicia celo: kolekti aldonajn 5 mil dolarojn por la programo.

(Estraro de ESF)

2.3 Esplorgrupo „Ekonomio kaj Lingvo“ ĉe Humboldt-Universitato

La esplorgrupo „Ekonomio kaj Lingvo“ (Research Group “Economics and Language“, REAL) konistas el *Bengt-Arne Wickström*, *Michele Gazzola* kaj *Torsten Templin*. Ĝi funkcias ekde septembro 2014 en la Fakultato por kulturscienco, sociala scienco kaj klerigscienco ĉe *Humboldt-Universitato de Berlin*.

La kunlaborantoj de REAL estas parto de la MIME-Projekto („**M**obility and **I**nclusion in **M**ultilingual **E**urope”, vd. 1.5), subtenata de la Komisiono de EU (7-a kadra programo).

La celo de la esplorgrupo estas la pluevoluigo kaj apliko de ekonomia aliro kaj de metodoj de politikaj analizoj en la lingvoscienco.

Ĉefaj esplortemoj estas lingva dinamiko, lingvo-politiko, ekonomio de lingvo kaj de lingvaj rajtoj.

La esplorgrupo okazigis en 2013 la konferencon „The Economics of Language Policy“ kaj en 2015 la simpozion „Economics, Linguistic Justice and Language Policy“

(<https://www.erziehungswissenschaften.hu-berlin.de/de/wipaed/Forschung/projekte/oekonomie-und-sprache>)

2.4 Universitataj laboraĵoj

2.4.1 *Ethan G. Wilcox*: Bakalaŭra studo pri la sovetia Esperanto-movado

Wilcox, Ethan Gotlieb (2015): *Revolutionary Linguistics. The Ideology of the Soviet Esperanto Movement, 1917-1938*. Stanford: Stanford University, Department of Slavic Languages and Literatures. 84 p.

Kontakto: Wilcoxeg@stanford.edu

2.4.2 Magistraj laboraĵoj

2.4.2.1 Irene Caligaris pri la identeco de esperantistoj

Caligaris, Irene (2015): *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese. Una ricerca sul campo sulle identità esperantiste*. Torino: Università degli studi di Torino, Corso di Laurea in Scienze Linguistiche. Gvidanto: Prof. d-ro Federico Gobbo, 460 p.

2.4.2.2 Eva N. Zaki pri Esperanto kaj ĝia lingvo-komunumo

Zaki, Eva Neferte (2015): *Quelle image pour l'espéranto? Regard sur l'image à travers les principales positions idéologiques du mouvement en Europe*. Université de Genève: Faculté de traduction et d'interprétation. Gvidis: François Grin, Véronique Sauron, 156 p.

Abstract

„Le présent travail étudie l'image publique de l'espéranto en Europe, à travers les principales positions idéologiques choisies par les branches importantes du mouvement au cours de son histoire. Le terme "image" est utilisé ici dans le sens de la communication au sujet de la langue par les représentants des organisations espérantistes. Afin de dessiner les contours de l'image, l'étude s'appuie sur des dates-clés de l'histoire du mouvement espérantiste, ayant marqué des choix idéologiques importants. Des conclusions et recommandations sont proposées en vue de l'élaboration d'une stratégie de communication positive et efficace. L'objectif plus large de l'étude est de proposer que l'image de l'espéranto soit étudiée dans la perspective d'une politique de communication au sujet de la langue pouvant accompagner une politique linguistique la concernant“.

Eva Neferte Zaki al kelkaj personoj starigis 14 franclingvajn demandojn lige al la laboraĵo. La respondoj (en angla traduko) eniris la laboraĵon en jena vicordo: *Detlev Blanke, Seán Ó Riáin, Bernhard Tuidler, Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes*. Ili estas dokumentitaj sur p. 126-156.

Kontakto: Eva-Neferte.Zaki@etu.unige.ch

PDF-dosiero: <http://archive-ouverte.unige.ch/unige:75452>

2.4.3 Angela J. Tellier: Doktoriga disertacio pri metalingva konscio kaj lerno de lingvoj

Angela J. Tellier (2015): *Metalinguistic awareness and foreign language learning in primary school: A classroom study with children aged 8 to 9 years*. A thesis submitted for the degree of Doctor of Philosophy in Applied Linguistics, Department of Language and Linguistics, University of Essex. March 2015, 1-XIV, 310 S.

Resumo

La tezo esploris la evoluon de metalingva (prilingva) konscio [metalinguistic awareness] en angleparolantaj infanoj 8-9-jaraĝaj en ŝtata bazlernejo en Anglio (193 infanoj), kaj la eventuala lernfaciliga efiko de enkonduka lingvo rilate al lernado de dua lingvo; specife ĉu Esperanto, lingvo travidebla, povus plialtigi al infanoj la metalingvan konscion, ekstarti ilian kapablon lerni eksplicite, kaj siavice efike la akiradon de dualingva kapablo [second language proficiency].

Grupoj sekvis enkondukajn (lingvolernajn) programojn en la germana, la itala aŭ Esperanto dum la unua duono de la traktad-periodo (20 horoj en 16 semajnoj). La grupo „Esperanto-plus“ sekvis la saman programon, sed okupiĝis celhave pri lingvokonscio [focus-on-form]

anstataŭ fari iujn reviziajn taskojn de la aliaj grupoj. Ĉiuj grupoj sekvis la saman programon en la franca dum la alia duono de la traktado (20 horoj en 16 semajnoj). Datumoj estis kolektitaj dufoje pri lingvolerna kapablo [language learning aptitude], metalingva konscio kaj sintenoj rilate lingvolernadon, kaj tri fojojn pri dualingva kapablo, inkluzive prokrastitan post-teston. Krome, datumoj estis kolektitaj pri la kapabloj de la infanoj legi kaj skribi je la aĝo 7. Ĉiuj grupoj faris statistikan progreson rilate al dualingva kapablo, metalingva konscio kaj lingvolerna kapablo.

La grupo „Esperanto-plus“ atingis statistike pli grandajn gajnojn ol la germanaj kaj italaj grupoj rilate al metalingva konscio, kio sugestas ke celhava agado pri lingvokonscio ludis stimulan rolon en la plibonigado de metalingva konscio, kvankam la travidebleco de Esperanto eble estis faktoro kontribuanta. Metalingva konscio sin montris kiel forta antaŭdirilo de dualingva kapablo por la tuta kohorto ĉe post-testo, kaj legokapablo en la unua lingvo (la angla) je la aĝo de 7 kiel dua indikilo.

Kvankam inter grupoj evidentiĝis nenioj statistikaj diferencoj por dualingva kapablo kiel tutaĵo, la grupo Esperanto-plus atingis statistike pli bonajn rezultojn ol la germana grupo ĉe aŭskultado en la post-testo kaj la prokrastita post-testo. Malpli kapablaj infanoj en la grupo „Esperanto-plus“ atingis statistike pli bonajn rezultojn ĉe legado ol la Esperanto-grupo en la post-testo kaj la grupo de germanaj kaj italaj infanoj (kombinita por la esploroj pri malpli kapablaj infanoj) ĉe prokrastita post-testo. Tendencoj apogas la konkludon ke la lingvolerna programo „Esperanto-plus“ alportis avantaĝojn, precipe por infanoj malpli kapablaj.

3 Scienco kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lille

La 100-a UK okazis de 25.07.-01.08.2015 en la franca urbo Lille. Partoprenis ĉ. 1700 personoj el 80 landoj.

3.1 Kongresa temo: *Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj*

La kongrestemon oni traktis en diversaj aranĝoj. Menciindas jenaj prelegoj (pri kiuj oni petis komentojn):

Ilona Koutny, PL: *Ĉu Esperanto havas specialan lingvan bildon* (komentis: Detlev Blanke).

A. Giridhar Rao, IN: *La angla en Barato – edukado, tutmondiĝo kaj justeco* (komentis: Sabine Fiedler).

Hiroyuki Usui, JP: *Esperanto en orienta Azio: Ĉu por la homara progreso aŭ interciviliza konkurenco?* (komentis: Probal Dashgupta).

Christian Lavarenne, FR: *Ĉu nur pala surogato de Hilelismo kaj Homaranismo? La interna ideo kiel valoro en la dialogo inter la kulturoj* (komentis: Ulrich Lins).

3.2 Internacia Kongresa Universitato (IKU)

Kadre de la 68-a Sesio de Internacia Kongresa Universitato en Lille oni prezentis 10 prelegojn. La aktoj aperis:

José Antonio Vergara (2015, red.): *Internacia Kongresa Universitato. 68-a Sesio. Lillo, Francio, 25 julio – 1 aŭgusto 2015*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 111 p.

Ni aparte menciuj jenajn prelegojn:

Pascal Dubourg Glatigny: *La lingva demando en la nuntempa arto*

Mikaelo Bronŝtejn: *Rusoj en la Esperanta poezio*

Cyril Brosch: *La hitita lingvo: Ĉu „filino“ aŭ „fratino“ de la prahindeŭropa?*

3.3 Faka aranĝo de ISAE

Jam vendrede, la 24-an de julio 2015, Internacia Scienca Asocio Esperanta, (ISAE) sub gvido de ties prezidanto *José Antonio Vergara* (CL) okazigis aranĝon, bedaŭrinde tro malmulte konatan. En ties kadro oni prezentis jenajn prelegojn:

José Antonio Vergara, CL: "*Limigita plurlingveco en la scienca komunikado kiel epoka kunteksto por la naskiĝo de ISAE*"

Detlev Blanke, DE: "*Wilhelm Ostwald kaj liaj interlingvistikaj konceptoj*"

José Antonio Vergara, CL: "*La daŭra strebado utiligi Esperanton por sciencaj celoj en scenejo evoluanta al angla unulingvismo*"

Francesco Maurelli, IT: "*Ĉu indas scienco en Esperanto?*"

Orlando Raola, US: "*Nuntempa projekto esperantigi la verkegon Ĝenerala, Organika kaj Biologia Kemio de H. S. Stoker*"

Anthony Lucas, FR: "*Kial okupiĝi nuntempe pri scienca agado en Esperanto? Vidpunkto de franca bio-inĝeniero*"

Michal Matúšov, SK: "*Esperanto kaj Libera Scio*"

José Antonio Vergara, CL: "*Serĉi novajn vojojn kaj partnerojn: tutmonda scienca civitaneco kaj lingva justeco*"

3.4 Kleriga Lundo

Dum pli ol la lastaj 10 UK-oj lunde okazis vico da klerigaj aranĝoj („Kleriga lundo“). En Lille i.a. temis pri *merkato, eŭritmio, Grundtvig-projektoj, ĝentileco* (kiel pardonpeti en Esperantujo), *E@I*, *la arto paroli publike, memoroj pri la japana katastrofo en 2011 k.a.*

3.5 Tago de la Lernejo

Kadre de la „Tago de la Lernejo“ oni prezentis jenajn 14 prelegojn:

Jerome Caré, FR: *Konciza prezento de la franca edukistemo*

Renée Triolle, FR : *Lingvo-instruado: ĉu malfermita pordo aŭ enkaĝigo?*

Mireille Grosjean, CH: *Pacedukado: Paŝoj al plena konkretiĝo. Raporto pri la Tria Tutmonda Kolokvo*

Stefan MacGill, HU: *AMO tra 16 monatoj*

- Alan Bishop, AU: *Valoroj en Esperantujo: ilia karaktero kaj evoluo en edukado*
- Gong Xiaofeng, CN: *Kapabligo pri transkultura komunikado kaj Esperanto-instruado*
- Veronika Póor, HU: *Muzaiko: kiajn kapablojn evoluigas la aŭskultantoj kaj/ aŭ kunkreantoj?*
- Dennis Keefe, US: *La filozofio de John Dewey kaj ĝia rilato al la enmeto de internacia kulturo en kursojn de Esperanto.*
- Nina Daniljuk, UA: *Interkultura edukado kaj komunikado en la universitata Esperanto-Centro*
- Duncan Charters, US: *Kiel plej efike lerni Esperanton kaj aliajn lingvojn?*
- Ilona Koutny, PL: *Interkultura komunikado kaj Esperanto en universitata programo*
- Mark Fettes, CA: *Esperanto en la kadro de interkulturaj kaj tutmondecaj studoj: Usona eksperimento*
- Katalin Kováts, HU: *Lerni Esperanton helpe de moderna teknologio*
- Stano Marček: *Kiel progresas „Esperanto per rekta metodo?“*

3.6 Esperantologia Konferenco

La 38-a Esperantologia Konferenco havis la kadran temon „Retrorigardo kaj antaŭvido: Kvardek jaroj da Esperantologio 1975-2015 kaj defioj por la estonteco“

La konferencon gvidis Orlando Raola. Oni prezentis jenajn prelegojn³:

- Detlev Blanke, DE: *La Esperantologiaj Konferencoj – motivoj, rezultoj, problemoj*
- Věra Barandovská-Frank, CS: *Konceptoj kaj difinoj de interlingvistiko kaj esperantologio*
- Probal Dashgupta, IN: *Ĉu ni kreskis gramatike?*
- Federico Gobbo, IT: *Kien estas iranta la esperantologio?*
- Hitoshi Gotoo, JP: *Pli kaj pli da krudmaterialoj por historiaj esploroj*
- Humphrey Tonkin, US: *Esperantologio – tiam, nun, estontece*
- Hiroyuki Usui, JP: *Eble esplori la rilatojn inter regionaj identecoj, piĝinaj/kreolaj lingvoj, denaskaj esperantistoj*

Oni krome montris pritemajn afiŝojn (pri esplorrezultoj) de Sabine Fiedler (frekvencvortaroj de Universitato Leipzig), Angela Tellier (esploroj pri la germanisto kaj interlingvisto William Collinson), Irene Caligaris/Federico Gobbo (identecoj de esperantistoj), Marek Blahuš (ciferecigo de la zamenhofaj adresaroj) kaj de Cyril Brosch (prezento de la scienca organizaĵo „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“/Societo pri Interlingvistiko)

³ Vidu en la revuo Esperanto, 9/2015, p. 177.

3.7 Kunsidoj de CED kaj ESF

Gravan rolon ĉe la kunordigado kaj financa subtenado de lingvo-politikaj, interlingvistikaj, esperantologiaj kaj lingvo-instruaj laboroj, aparte en la reto, ludas i.a. „Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj“ (CED) kaj „Esperanto Studies Foundation“ (ESF). Pri ambaŭ institucioj okazis kunvenoj.

En la kadro de la CED-kunveno la bibliotekisto mag. *Bernhard Tuidler* el Vieno prezentis la tutmonde plej grandan kolekton de planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko (vd. la eseon de de B. Tuidler pri la alirebloj al la kolekto, aperonta en IpI 96 (1/2016).

4 Novaj gravaj publikigaĵoj

La sube menciitaj titoloj libroj pro kompleteco reaperas en la Aktuala Bibliografio 7.

4.1 *Michael Gordin: Scientific Babel*

Gordin, Michael D. (2015): *Scientific Babel. How Science Was Done Before and After Global English*. Chicago, London: The University of Chicago Press, 415 p. (kun ampleksa miksita indekso p. 403-415).

La aŭtoro detale priskribas la ŝanĝiĝantan rolon de lingvoj kiel komunikiloj en la scienco. Temas pri la latina, franca, germana, rusa kaj fine pri la aktuale dominanta angla.

Iom ampleksajn ĉapitrojn li dediĉas ankaŭ al planlingvoj (i.a. Volapük, Esperanto, Ido, la roloj de Couturat, Jespersen, Ostwald k.a., p. 105-158). Tiu objektiva kaj sobra prezento tamen limiĝas al la historia tempo ĝis apenaŭ post la Unua Mondmilito. Pri la nuna situacio de planlingvoj la aŭtoro ne traktas, sed serioze interesiĝas (laŭ privata konversacio).

Bedaŭrinde mankas alfabete ordigita kompleta bibliografio de la uzita literaturo. La ampleksaj fontindikoj aperas ordigitaj laŭ ĉapitroj. Tio malfaciligas la orientiĝon pri la fontoj.

4.2 *Roberto Garvía: Esperanto and its Rivals*

Garvía, Roberto (2015): *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press, 226 p. (kun ampleksa bibliografio p. 199-217 kaj miksita indekso p. 219-226).

La aŭtoro uzas relative multan interlingvistikan literaturon. Li priskribas la malsamajn strategiojn de planlingvaj movad(et)oj, aparte tiujn de Volapuko, Esperanto kaj Ido. Ĉar la libro aperis anglalingve ĝi helpas malkonstrui antaŭjuĝojn pri la temo.

Enhavo:

Introduction

1. The Emergence of Linguistic Conscience

PART I. VOLAPÜK

2. A Language in Search of a Problem

3. Who Were the Volapükists?

4. "Pandemonium in the Tower of Babel": The Language Critics

5. "Strangled in the House of Its Friends": Volapük's Demise

6. "My Troubled Child": The Artist and the Kulturkampf

PART II. ESPERANTO

7. "The Purpose of My Whole Life": Zamenhof and Esperanto
8. "Let Us Work and Have Hope!": Language and Democracy
9. "The Menacing Thunderstorm of Reforms": First Esperantists and First Crises
10. The French Resurgence
11. "Bringing Together the Whole Human Race": Esperanto's Inner Idea

PART III. THE ESPERANTO CLUSTER: SAME LANGUAGE, DIFFERENT COMMUNITIES

12. The Demographics of *Esperantujo*
13. Pacifists, Taylorists, and Feminists
14. "Hidden-World Seekers": Esperanto in New Wave and Old Religions
15. Freethinkers, Socialists, and Herderians

PART IV. IDO AND ITS SATELLITES

16. "One Ideal International Language": Ido
17. "Linguistic Cannibalism"

Conclusion

Notes

Bibliography

Index

Acknowledgments

(Intervjuo kun la aŭtoro: <http://www.liberafolio.org/nova-akademia-verko-pri-esperanto>, ankaŭ vidu: <https://books.google.de/books/p/pennpress?q=&hl=EN&vid=9780812247107>)

4.3 INDECS: „The Phenomenon of Esperanto“

La kroata revuo „*Interdisciplinary Description of Complex Systems. (INDECS)*“ aperigis priteman kajeron pri la fenomeno Esperanto en en vol. 13 (2015), issue 2: special issue: „The phenomenon of Esperanto“. La kajeron redaktis *Veronika Poor* kaj *Humphrey Tonkin*, p. 181-341.

Enhavo:

Poór, Veronika: *Foreword*, p. 181

Tonkin, Humphrey: *Introduction: In Search of Esperanto*, p. 182-192.

Tonkin, Humphrey: *Language planning and planned languages: How can planned languages inform language planning?* p. 193-199

Blanke, Detlev: *How not to reinvent the wheel...The essential scholarly literature in interlinguistics and esperantology*, p. 200-215.

Blanke, D./Blanke, Wera: *Is scholarly communication possible in a so-called „artificial“ language?* p. 216-235.

Koutny, Ilona: *Can complexity be planned?* p. 236-249.

- Fiedler, Sabine: *Esperanto phraseology*, p. 250-263.
- Gobbo, Federico: *Machine translation as a complex system, and the phenomenon of Esperanto*, p. 264-274.
- Jansen, Wim: *Grammar: a complex structure. A linguistic description of Esperanto in funktional discourse grammar*, p. 275-287.
- Charters, Duncan: *The teaching and learning of Esperanto*, p. 288-298.
- Konishi, Sho: *The science of symbiosis and linguistic democracy in early twentieth-century Japan*, p. 299-317.
- Wandel, Amri: *How many people speak Esperanto? or: Esperanto on the Web*, p. 318-321.
- Puškar, Krunoslav: *Esperanto (sen) perspektivo? Croatian esperantists on the international auxiliary language Esperanto*, p. 322-341.

(Kun resumoj en la angla kaj kroata. La tekstoj facile alireblas kiel PDF-dosieroj: http://indec.eu/index.php?s=13_2&y=2015).

4.4 Enciklopedie: Historioj de Esperanto-Literaturo (Sutton kaj Minnaja/Silfer)

Antaŭ kelkaj jaroj aperis bonega enciklopedio pri la originala literaturo en Esperanto:

Sutton, Geoffrey (2008): *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. New York: Mondial, 728 p.

Estas tre salutinde, ke *Geoffrey Sutton* verkis sian enciklopediecan superrigardon en la angla kaj tiel atingas celgrupon ekster Esperantujo.

La verko ankaŭ entenas recenzojn, diskutojn kaj aliajn materialojn kaj krome aparte ampleksajn bibliografiojn de la priskribitaj pli ol 300 verkoj kaj de la sekundara literaturo (603-674). Ĝi ankaŭ havas detalan miksitajn indeksojn (temoj kaj personoj, 675-728).

Dum somero 2015 aperis plia enciklopedieca verko pri la historio de (la) Esperanto-Literaturo:

Minnaja, Carlo/Silfer, Giorgio (2015): *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: LF-koop., 748 p.

La tre detala enhavtabelo (I-VI) kaj kelkaj indeksoj faciligas la orientiĝon pri la riĉa enhavo. Temas pri jenaj indeksoj: bildoj/fotoj: 689-692; pritraktitaj verkoj: 695-713; revuoj: 715-717; temoj: 719-732; personoj: 733-748.

La ampleksaj fontindikoj estas ordigitaj laŭ ĉapitroj (559-608), sekvas bibliografieto. (La disvastigon de la verko subvenciis ESF).

Kelkaj komentoj:

(1) Ambaŭ enciklopediaj verkoj sin direktas al malsamaj celgrupoj kaj tiel povus kompletigi unu la alian. *Minnaja/Silfer* tamen tre malmulte mencias *Sutton* (duona paĝo 532 kaj mencio en la bibliografio p. 610). Oni estus atendinta kunlaboron de la tri fakuloj.

(2) Jam en la titolo (kaj en la enkonduko) *Sutton* klare indikas, ke li verkis sole pri la originala literaturo. La ampleksa traduka literaturo ne estas pritraktita.

Ankaŭ *Minnaja/Silfer* traktas preskaŭ ĉefe la originalan literaturon, mencias nur foje gravajn tradukojn en piednoto (ekz. Faust I+II de Goethe en la brila traduko de *Karl Schulze*, p. 189). Aliflanke menciigas diversaj tradukoj de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj aliaj.

En Esperanta traduko tamen aperis multaj verkoj de de la monda literaturo kaj malpli konataj verkoj de „malgrandaj“ nacioj. Tiuj verkoj taksigas gravaj kontribuoj de Esperanto al la interkultura komunikado, al la konatiĝo kun alilandaj kulturoj.

Krom tio por multaj esperantistoj la tradukaĵoj gravas por la evoluigo de ilia lingva kompetenteco, eble ne malofte pli gravas por ili ol originala literaturo. La traduka literaturo sendube apartenas al la Esperanta literaturo. Pro tio ties ignoro ne estas komprenebla.

Ankaŭ ekzistas lingvo-krea aspekto. La originala verkanto lingve troviĝas en la pli malpli vastaj limoj de sia kompetenteco. La tradukanto devos serĉi adekvatajn lingvajn solvojn por redoni la ofte malfacilajn originalaĵojn. Li/ŝi havas pli malfacilan situacion ol la originale verkantoj. Krom tio tradukado ne estas nur lingva afero, kiel malĝuste sugestas PIV⁴. Temas pri transigo de enhavoj el unu kulturo al alia. Pro tio ne malofte bonaj tradukoj estas lingve pli postulemaj kaj pli valoraj ol originalaj verkoj.

Do, ankoraŭ restas la defio verki la historion de la (ĉefa) traduka literaturo en Esperanto.

(3) Kompreneble, ankaŭ enciklopedia verko ne povas esti kompleta La angla titolo de la verko de *Sutton* ne sugestas kompletecon, tamen la titolo de *Minnaja/Silfer*. La artikolo en „Historio de la esperanta literaturo“ sugestas kompletecon. Pli trafa estus „Historio pri esperanta literaturo“.

(4) Kaj fine tre strange impresas ĉe *Minnaja/Silfer* la magra bibliografio (600-610), kontraste al *Sutton*. Estintus pli bone envicigi en la finan bibliografion la multajn fontojn arigitajn sub la unuopaj ĉapitroj. Ne gravas, ĉu temas pri „gravaj“ aŭ „malgravaj“ fontoj. Fonto estas fonto kaj devas aperi en bibliografio. Mi rimarkis alian neprofesiecan trajton de la bibliografio: je mia mirego mankas la eldonlokoj! Ankaŭ dezirintus plenaj antaŭnomoj, sed indiki ilin bedaŭrinde ankoraŭ ne ĉie estas kutimo.

Malgraŭ ĉio ankaŭ la verko de *Minnaja/Silfer* estas monumenta kontribuo pri granda parto de la esperanta kulturkreaĵo.

Detlev Blanke

4.5 Aleksander Melnikov: Manlibro de la Esperanto-Kulturo

Melnikov, Aleksandro S. (2015): *Gvidlibro tra Esperantio. Konciza leksikono de la Esperanto-kulturo: esperantonimoj, realioj kaj flugilhavaj vortoj*. Rostov-na-Donu: Izd. Mini Tajp, 528 p.

(La verko estas subvenciita de ESF).

Kiel la du menciitaj verkoj pri Esperanto-literaturo ankaŭ la libro de Melnikov estas tre grava por la prezento de la specifa esperantlingva kulturo. Komence (3-36) la aŭtoro klarigas la celon kaj strukturon de la verko kaj difinas kelkajn centrajn nociojn (Esperanto-kulturo, esperantonimoj). Li ankaŭ priskribas lingvistike la estiĝon de esperantonimoj kaj montras la ĉefajn metodojn de ili kreiĝo. La libro ĉefe entenas informojn pri personoj, realaĵoj, esperantonimoj kaj specifajoj originantaj en la historio kaj nuntempo de la lingvo-komunumo.

⁴ Laŭ PIV 2005 (p. 1171) traduki estas: „Transigi iun tekston aŭ konversacion de unu lingvo en alian, anstataŭigante vortojn k esprimejoj de la unua lingvo per samsencaj vortoj aŭ esprimoj de la alia“.

La ampleksa materialo estas ordigita alfabete (37-319). Ĉiu artikolo, ĉiu ekzemplo estas pruvita per fontindikoj, kiuj aperas en la bibliografio (320-329). Aldonaĵo al la libro (330-486) entenas gravajn dokumentojn (tekstoj de Zamenhof, rezolucioj, manifestoj kaj aliaj materialoj). Miksita indekso (temoj kaj personoj, 487-516) faciligas la orientiĝon en la verko ne simple strukturita.

4.6 Hermann M. Ölberg pri Interlingvistiko kaj Esperantologio

La eldonejo Edition Iltis (en la germana urbo Bad Bellingen) elstaras pro multaj valoraj publikaĵoj. Tio aparte koncernas antologiojn kaj bibliografiojn.

Antaŭ nelonge aperis antologio de artikoloj de la aŭstra albanologo kaj interlingvisto *prof. dro Hermann M. Ölberg* (*1922) el Innsbruck:

Ölberg, Hermann M. (2015): *Aufsätze zur Interlinguistik und Esperantologie*. Mit einem Vorwort von Manfred Kienpointner. Herausgegeben von Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Edition Iltis, 140 S. (kun foto de Ölberg).

Enhavo:

- *Vorwort des Herausgebers* / (Prefaco de la editoro Reinhard Haupenthal)
- *Hermann Ölberg als Universitätslehrer* / (Hermann Ölberg kiel universitata instruisto de Manfred Kienpointner)

Aufsätze zur Interlinguistik und Esperantologie/ artikoloj pri interlingvistiko kaj esperantologio

- *Zur Grundlegung der Interlinguistik* / (Pri la fundamentigo de interlingvistiko)
- *Die Suffixe in den Plansprachen* / (La sufiksoj en la planlingvoj)
- *Einige Überlegungen zum Thema Interlinguistik* / (Kelkaj pripensoj pri la temo interlingvistiko)
- *Weltspracheprojekte des 17. Jahrhunderts* / (Projektoj de mondlingvoj el la 17-a jarcento)
- *Interlinguistik – Teil der Linguistik?* / (Interlingvistiko – ĉu parto de lingvistiko?)
- *Die Weltsprachenfrage im wissenschaftlichen Werk Hugo Schuchardts* / (La mondlingva problemo en la scienca verko de Hugo Schuchardt)
- *Hermann Ammann als Interlinguist* / (Hermann Amman kiel interlingvisto)
- *Esperanto und gegenwärtige Linguistik* / (Esperanto kaj la nuntempa lingvistiko)
- *Plansprachen - Interlinguistik – Esperanto* / (Planlingvoj – interlingvistiko- Esperanto)
- *Bibliographie* / (Bibliografio)

4.7 Interlingvo inter lingvoj

Ekde 1950 UEA okazigas la „*Belartajn Konkursojn*“ por jenaj branĉoj

Poezio originala

Prozo originala

Eseo originala (nur ekde 1976)
Teatraĵo originala
Vidbendo,
Kanto
Infanlibro de la Jaro

Antaŭ nelonge aperis kolekto de premiitaj verkoj de la branĉo Eseo pri (inter)lingvistikaj temoj:

Lipari, Michela/Tonkin, Humphrey (2015, red.): *Interlingvo inter lingvoj. Prilingvaj eseoj.* Kun postparolo de Carlo Minnaja. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 271 p.

Enhavo:

Bernard Golden: *La sŭahila lingvo*

Bernard Golden: *Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj*

Nikola Rašić: *Digrafio. Speciala kazo de rilato inter lingvo kaj skribo*

Christian Rivière: *Vortfarado kaj radikfarado*

Christian Rivière: *Tamen kompreni: Rolo de la kunteksta redundanco*

Christian Rivière: *Mezuro de informo-kvanto*

Jan Werner: *Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado*

Marie Bartovska: *Komo*

Zsuzsanna Csiszar: *La lingvaĵo de porinfana literaturo*

Aleksandro Melnikov: *Leksikaj novismoj kaj neologismoj: Anatemi aŭ odi?*

Sten Johansson: *Ĉu fundamenta evoluo aŭ neologisma glosolalio?*

Geraldo Mattos: *Lingvo kaj dialekto*

Gonçalo Neves: *Niaj verboj sen vepro*

Sten Johansson: *Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj*

Xu Daorong: *Kiom da ĉina en Esperanto?*

Christian Rivière. *La pluralo*

4.8 KAEST 2014 pri arkivoj kaj bibliotekoj

Aperis la aktoj de KAEST 2014:

Novotničková, Katarína (2015, red.): *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon.* Partizánske: ESPERO, 173 p.

Enhavo:

Marek Blahuš: *Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj: rezultoj*

Detlev Blanke: *En Germanio: Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj sub ŝtata protekto*

Wera Blanke: *Antaŭ 3000 jaroj: La arkivo de faraono Eĥnatono*

Petr Chrdle: *La Esperanto-muzeo kaj biblioteko en Svitavy*

Miroslav Malovec: *Prilaboro de arkivaĵoj*

Bernhard Tuidler: *La Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Historio kaj evoluo, havaĵoj kaj projektoj*

Ján Vajs, Ľubomír Fajth: *Slovaka E-arkivo kaj memeoj*

Václav Zouzalík: • *Interretaj arkivoj*
• *Kial kaj kiel uzi la Krean Komunajn*

Peter Baláž: *La plej freŝaj aktivecoj de E@I en la kampo de edukado*

Piet (Petro) Buijnsters: • *Parolrekonaj sistemoj por Esperanto*
• *Tekstkontroliloj por Esperantotekstoj*

Johan Derks: *Kiom internacia estas via vorto?*

Hans Michael Maitzen/Anneliese Schnell: *Esperanto-rilataj objektnomoj en la arkivo de asteroidoj*

Vít Guiglielmo Mišurec: *Kemio en manĝaĵo – ĉu bona aŭ malbona?*

Julia Noe: *Librokrucigo – Bookcrossing*

Jozef Reinart: *La Nacia Konvencio pri EU: tutsocia diskutplatformo en Slovakio – modelo por EU-membroŝtatoj*

Konstantin Tikhomirov: • *Problemoj de transliterumo kaj latinigo de la rusa lingvo*
• *Diabeto ĉe malgrandaj bestoj*

Ján Vajs: *Grotsistemoj en la valoj Demänovská dolina kaj Jánska dolina*

Jan Uldal Niemann intencas redakti *manlibron pri arkiva laboro*.

4.9 Esperantologio – Kajero 7

Aperis la 7-a kajero de la revuo Esperantologio – Esperanto studies (EES), ĉefredaktata de Christer Kiselman, ricevebla kiel PDF-dosiero ĉe: www.cb.uu.se/esperanto.

La presitan eldonon aperigis la ĉeĥa eldonejo KAVA-PECH (Dobříšovice)

Kajero 7 (2015), 125 p.:

Christer Kiselman: *Salutvorto de la redaktoro* .

Christer Kiselman: *A word from the editor*.

Barandovská-Frank, Věra: *Grava verko de la kreinto de Novial. Recenzo de la verko de Otto Jespersen Meine Arbeit für eine internationale Sprache*.

Krause, Bernd: „*Vi vidis antaŭe la venkon de l' vero!*“ *Leon Zamenhofs Nachrufgedicht auf Leopold Einstein von 1922*.

Jansen, Wim: *Kelkaj aspektoj de Esperanto laŭ Funkcia Diskurs-Gramatiko*.

Nordenstorm, Leif: *Views on Esperanto in the Bahá'í faith: A revised subchapter in Bahá'u'lláh and the New Era*.

Dankova, Natalia: *Future participles in the writings of Zamenhof*.

Kiselman, Christer: *Kombineblo de vortelementoj en esperanto – rigardoj malantaŭen kaj antaŭen*.

Kiselman, Christer: *Geraldo Mattos (1931- 2014)*.

Kiselman, Christer: *Pri la revuo Esperantologio / Esperanto Studies 1999 - 2015*.

4.10 Aktoj de la 36-a Esperantologia Konferenco (2013)

Kiselman, Christer/Vergara José Antonio (2015, red.): *De esperanta korpuso ĝis islanda lingvopolitiko*. Aktoj de la 36-a Esperantologia Konferenco en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko 2013. Rotterdam: UEA, 78 p.

Enhavo:

Christer Kiselman & José Antonio Vergara: *Antaŭparolo*

Eckhard Bick: *DeepDict: Kunteksta reta vortaro de vera lingvouzo* .

Probal Dasgupta: *„Postkuri’ ne estas ,kuri post’ : Esperanto kaj la plenvorta morfologio*

Usui Hiroyuki: *Pra-sennaciismo en oriento: japana „ultranaciisto“ kaj ĉinaj anarkiistoj*

Detlev Blanke: *Kiel kaj kie informiĝi pri faka literaturo? Pri kelkaj lastatempaj esperantologiaj publikaĵoj*

Guðrún Kvaran: *Islandsk sprogpolitik, loven om det islandske sprog og Islandsk sprognævns opgaver (originalo en la dana)*
(*Islanda lingvopolitiko, la leĝo pri la islanda lingvo kaj la taskoj de Islanda lingvokonsilio [esperantigis Christer Kiselman]*)

Programo de la konferenco 2013-07-25
Program of the conference 2013 July 25

4.11 Language. Communication. Information (AMU, Poznań)

Unufoje jare aperas la pola revuo *Język. Komunikacja. Informacja – Language. Communication. Information*. Ĝin aperigas la Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań. Al la redakta stabo apartenas ankaŭ *Ilona Koutny*.

La kajeron 2014 redaktis *Ilona Koutny* kaj *Piotr Nowak*.

Contents

László Marác: *On norms and linguistic categories in Linguistic Diversity Management*

Michael Farris: *The psychological economy of the English language industry*

Tatjana Navicka: *The model of formation and transmission of Latvian citizens' national identity on the basis of the 'Sustainable Development Strategy of Latvia until 2030'*

Sabine Fiedler: *Scientific communication in a lingua franca*

Bradius V. Maurus III: *The Sanskrit experience and language planning*

Szymon Pawlas: *'Bliss, picto, pictopen' – auxiliary ideographic writing systems*

Edit Takács: *Beyond aspect – a case study of the Hungarian 'talál – megtalál'find' constructions*

Marc Bavant: *Resultative aspect and diathesis in Esperanto*

Agnieszka Górka: *Cats in culture – the example of early English poetry for children*

Przemysław Wiatrowski: *More on the origin of selected phraseological units in Polish and Indonesian*

Reviews

Głaz, A., Danaher, D., & Łozowski, P. (Eds). 2013: *The Linguistic Worldview: Ethnolinguistics, Cognition, and Culture*. London: Versita. 492 p. (Ida Stria)

Chronicle

Third Interlinguistics Symposium (Ida Stria & Ilona Koutny)

Relacja z konferencji interlingwistycznej „GIL-Jahrestagung 2014“ Report on the interlinguistic conference „GIL –Jahrestagung 2014” (Cyril Brosch)

Resumoj en Esperanto

Authors

Komplete elŝutebla sub: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-ix,13

4.12 Festlibro por Tamás Gecső

La 21an de majo 2015 la hungara lingvisto *prof. Tamás Gecső* festis sian 60-an naskiĝtagon. Pli ol 10 jarojn li gvidis la katedron por Aplika Lingvistiko ĉe la Universitato ELTE en

Budapesto. Dum tiu tempo li ankaŭ respondecis pri la fako „Esperanto – lingvo kaj literaturo“. La fako bedaŭrinde ne plu ekzistas.

Folmeg, Márta / Jóri, Anita (2015, red.): *Világ és nyelv szenvedéllyel. Köszöntő kötet Gecső Tamás 60. születésnapjára*. Budapest: Tinta Kiadó, 308 p.

En la festlibro troviĝas jenaj tri kontribuoj de esperantistoj:

Bujdosó, Iván (2015): „Az eszperantóul beszélők számának változása“. (Ŝanĝiĝoj de nombroj de hungaraj parolantoj de Esperanto), p. 118-121.

Kiss, László Péter (2015): „Melléknevek az eszperantóban“. (Adjektivo en Esperanto), p-122-129.

Salomonné Csiszár, Pálma (2015): „Hogyan erősítsük meg gyermekünk kétnyelvűségét?“ (Kiel oni povas pliprofundigi la dulingvecon de infano? p. 182-188..

4.13 Sociologia analizo pri UEA

Galor, Zbigniew/Pietiläinen, Jukka (2015): *UEA en Konscio de Esperantistoj*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 167 p.

„UEA en konscio de esperantistoj“ estas detala sociologia esploro pri la Esperanto-movado, kiu daŭrigas kaj kompletigas la sociologiajn verkojn de Peter Forster, Frank Stocker kaj Nicola Rašić.

La ideo pri tiu ĉi esploro naskiĝis dum la 93-a UK en Roterdamo (2008), kaj la enketado komenciĝis okaze de la 94-a UK en Bjalistoko (2009).

La unua parto de la libro prezentas la rezultojn de tiu kvanta esploro: ĝi skizas portreton de la respondintaj esperantistoj, interalie, rilate al la Esperanto-kulturo, motivoj interesiĝi pri Esperanto, opinioj pri UEA kaj la UK-oj, UEA-membreco (forlaso, reveno, tipoj de membroj), ktp. La aŭtoroj prezentas la bildon de UEA el la perspektivo de FLAM (SWOT)-analizo (analizo de fortoj, malfortoj [“lamaĵoj”], avantaĝoj kaj minacoj), kaj ili prikomentas la kontraŭdiron inter la internaj kaj la eksteraj celoj de la organizo.

La dua parto de la libro traktas la imagojn pri UEA en pli larĝa sociideologia kunteksto: ekzemple, ili traktas la interligon de Esperanto kun socialismo kaj kapitalismo, interkomunikon problemon kaj ideologion, kaj, fine, lingvan imperiismon. La verkon kompletigas impona listo de elektitaj publikaĵoj pri sociologio de Esperanto.

La libro estas subvenciita de ESF.

(Laŭ gazetara informo de UEA)

4.14 Aktoj de la 24-a GIL-Konferenco: La planlingva movado ĉirkaŭ la 1-a Mondmilito

Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (Red., 2015): *Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg*. Beiträge der 24. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21. – 23. November 2014 in Berlin. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V, 130 p.

Enhavo:

Cyril Brosch / Sabine Fiedler: *Einleitung* / Enkonduko

Cyril Brosch: *Der Erste Weltkrieg im Spiegel des „Germana Esperantisto“ und*

anderer Zeitschriften / La Unua Mondmilito en la spegulo de „Germana Esperantisto“ kaj aliaj revuoj

Roland Schnell: *Kriegspropaganda mit Esperanto – Das „Internacia Bulteno“ stellt von 1914 bis 1916 im Ausland die deutsche Sicht dar* / Militpropagando per Esperanto – la „Internacia Bulteno“ de 1914 ĝis 1918⁵ prezentas la germanan vidpunkton al la eksterlando

Bernhard Tuider: *Die Sammlung für Plansprachen und das Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek. Bestände zum Thema „Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg“ im virtuellen Lesesaal* / La planlingva kolekto de Aŭstria Nacia Biblioteko kaj la Esperanto-Muzeo. Materialoj pri la temo „La planlingva movado ĉirkaŭ la Unua Mondmilito“ en la virtuala legejo

Fritz Wollenberg: *La Rondiranto (Der Rundgänger) – eine Berliner Esperanto-Zeitschrift aus dem 1. Weltkrieg spiegelt Meinungen zu Krieg und Frieden* La Rondiranto – Esperanto-revuo el la 1-a Mondmilito el Berlin, spegulas opiniojn pri milito kaj paco

Detlev Blanke: *Stenografien und Plansprachen* / Stenografioj kaj planlingvoj

Wim Jansen: *Was ist und wozu brauchen wir eine Referenzgrammatik des Esperanto?* / Kio estas kaj por kio ni bezonas referencan gramatikon de Esperanto?

Kristin Tytgat: *Eine Sprache, viele Kulturen. Interkulturelle Kommunikation auf Esperanto* / Unu lingvo, multaj kulturoj. Interkultura komunikado per Esperanto

Über die Autoren / pri la aŭtoroj

5 Interlingvistiko en vortaroj ĉe de Gruyter

Cyril Brosch

Estas bedaŭrinda fakto, ke manlibroj aŭ vortaroj pri lingvistiko foje ne estas fidindaj fontoj rilate interlingvistikajn temojn, ofte pro neglekto de la faka literaturo.

Escepto ĉi tie estas la granda german- kaj anglalingva serio „Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft“ [manlibroj pri lingvo- kaj komunikadscienco] de la renoma eldonejo de Gruyter (Berlin, München, Boston), ĉar ĝiajn artikolojn efektive verkis fakuloj.

Intertempe aperis kiel komplemento nova serio kun la titolo „Wörterbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft“ [vortaroj pri lingvo- kaj komunikadscienco] (red. *Stefan J. Schierholz* kaj *Herbert Ernst Wiegand*). Ĝiaj artikoloj estas konsulteblaj ĝis nun nur interrete (kompreneble tamen ne senpage) sur www.degruyter.com/view/db/wsk, sed laŭ informo sur www.wsk.uni-erlangen.de estas planata ankaŭ libra eldono.

Tiukadre antaŭ nelonge aperis kelkaj artikoloj pri interlingvistikaj temoj, kiujn verkis konsulte kun kolegoj *Cyril Brosch* – fakte jam antaŭ longa tempo, sed pro organizaj kaj teĥnikaj ŝanĝoj kaj malfacilaĵoj flanke de la eldonantoj la publikigo prokrastiĝis.

Temas pri la artikoloj „Esperanto“, „Ido“, „Interlingua“, „natürliche Sprache“ [natura lingvo], „Novial“, „Occidental-Interlingue“, „Plansprache“ [planlingvo], „Universalsprache“ [universala lingvo] kaj „Volapük“.

⁵ La lasta kajero de la „Internacia Bulteno“ aperis en januaro 1919 (Red.).

Bedaŭrinde la elekto de la kapvortoj estis antaŭe fiksita kaj neŝanĝebla, tiel ekz. mankas kapvorto „interlingvistiko“. Dubon vekas ankaŭ la alordigo de la artikoloj al la planata volumo 3 „Historische Sprachwissenschaft“ [historia lingvoscienco], ekz. en la okazo de Esperanto.

La artikoloj havas maksimuman longon de 4000 karaktroj (kiu preskaŭ ĉiam estas atingita) kaj konsistas el la sekvaj partoj:

1. kapvorto
2. difino germana
3. difino angla
4. ĉefteksto de la artikolo (germanlingva)
5. bibliografio (maks. 5 eroj)
6. sendo al similtaj artikoloj

Kvankam certe estus pli bone, se interlingvistoj povus kunlabori jam dum elektado kaj alordigo dum la frua planado, oni tamen trovu pozitiva, ke ili povis verki la enhavon libere – ne estis poste rezervoj flanke de la eldonantoj, eĉ okaze de tia difino de „natura lingvo“, kiu nepre inkluzivas Esperanton – kaj neŭtrale kaj per aktuala fakliteraturo informi uzantaron espereble grandan pri tiuj temoj, kiuj ja enestas.

6 Eldonaĵoj de la Cifal Volapüka *Hermann Philipps*

La ĉefa volapukisto (Cifal Volapüka), la germano *Hermann Philipps* el Bonn (vd. la intervjuon en IpI 92-93 [1-2/2015]) reeldonis kelkajn interlingvistike interesajn librojn:

Höhle, Hans / Lantos, Herbert u.a. (1927/2011): *Lehrbuch der Weltsprache Ido für Arbeiter. Lernolibro por laboristi*. 2. Aufl. Berlin: Laboristal Ido-Uniono Internacia. 3-a eldono, nove eldonita de Hermann Philipps. Bad Godesberg: Hermann Philipps, 163 p. (kun aldonajoj).

Schmidt, Johann / Philipps, Hermann (1933/2013): *Lehrbuch der Weltsprache Volapük*. Bad-Godesberg: Hermann Phillips, 140 p.

Schwörer, Emil (1916/2012): *Kolonial-Deutsch*. Nove eldonita de Hermann Philipps. Diessen: Huber / Bad-Godesberg: Hermann Philipps, 63 p.

Pri akirebloj de la libroj informas: hphilipps@onlinehome.de

7 Aktuala Bibliografio 7

Aperis jenaj sekvoj de la Aktuala Bibliografioj en **IpI**: (1) 86(3/2913) p. 24-29; (2) 87(4/2013) 8-15; (3) 88-89(1-2/2014) 9-11; (4) 90 (3/2014) 7-10; (5) 91(4/2014) 20-27; (6) 92-93(1-2/2015) 27-30.

Adelman, Michael (2014): Constructed Languages and Copyright: A Brief History and Proposal for Divorce. → *Harvard Journal of Law & Technology*, Vol. 27, Number 2 Spring 2014, p. 544-562. (<http://jolt.law.harvard.edu/articles/pdf/v27/27HarvJLTech543.pdf>)

Alcalde, Xavier (2015): The Practical Internationalism of Esperanto. → *Peace in Progress (Institut Català International per la Pau [ICIP], Barcelona)*, No 24, september (Pacifists during the First World War).

http://www.icip-perlapau.cat/numero24/articles_centrales/article_central_5/

Ashauer-Jerzimeck, Hans Bernd (2015): Bekenntnis zu Weltoffenheit und Menschenfreundlichkeit. Zur Erinnerung an den Esperantisten Paul Tarnow (1881-1944).→*Düsseldorfer Jahrbuch. Beiträge zur Geschichte des Niederrheins*, Bd. 85, 2015, p. 271-289.

Barandovská-Frank, Věra (2015): Grava verko de la kreinto de Novial. Recenzo de la verko de Otto Jespersen „Meine Arbeit für eine internationale Sprache“.→*Esperantologio-Esperanto Studies* (EES), Kajero/Issue 7 (2015), 7-9.

Bartovska, Marie (2015): Komo.→Lipari, Michela/ Tonkin, Humphrey (eld.), *Interlingvo inter lingvoj. Prilingvaj eseoj*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 133-144

Bavant, Marc (2014): Resultative aspect and diathesis in Esperanto.→*Language. Communication. Information* (UAM, Poznań), Vol. IX (2014), p. 109-132. (Disponeblas kiel PDF: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-ix,13).

Bick, Eckhard (2015): DeepDict: Kunteksta reta vortaro de vera lingvouzo.→Kiselman, Christer/Vergara, José Antonio (2015, Red.), *De esperanta korpuso ĝis islanda lingvopolitiko*. Rotterdam: UEA; p. 7-17.

Blahuš, Marek (2015): Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj: rezultoj.→ Novotničková, Katarína (2015, red.): *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. (Resumoj en la angla, slovaka kaj Esperanto) Partizánske: ESPERO, p. 9-20.

Blanke, Detlev (2015): How not to reinvent the wheel... The essential scholarly literature in interlinguistics and esperantology.→ *Interdisciplinary Description of Complex Systems*. (INDECS), vol. 13 (2015), issue 2: special issue: The phenomenon of Esperanto, p. 200-215. PDF-dosieroj: http://indecs.eu/index.php?s=13_2&y=2015

Blanke, Detlev (2015): En Germanio: Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj sub ŝtata protekto.→ Novotničková, Katarína (2015, red.): *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. (Resumoj en la angla, slovaka kaj Esperanto) Partizánske: ESPERO, p. 21-32.

Blanke, Detlev (2015): Kiel kaj kie informiĝi pri faka literaturo? Pri kelkaj lastatempaj esperantologiaj publikaĵoj.→Kiselman, Christer/Vergara, José Antonio (2015, Red.), *De esperanta korpuso ĝis islanda lingvopolitiko*. Rotterdam: UEA, p. 53-66.

Blanke, Detlev/ Blanke, Wera (2015): Is scholarly communication possible in a so-called „artificial“ language?→ *Interdisciplinary Description of Complex Systems*. (INDECS), vol. 13 (2015), issue 2: special issue: The phenomenon of Esperanto, p. 216-235. PDF-dosieroj: http://indecs.eu/index.php?s=13_2&y=2015

Blanke, Wera (2015): Antaŭ 3000 jaroj: La arkivo de faraono Eĥnatono.→Novotničková, Katarína (2015, red.): *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. (Resumoj en la angla, slovaka kaj Esperanto) Partizánske: ESPERO, p. 33-39.

Bronštejn, Mikaelo (2015): Min trafis feliĉ' esti rusa poeto... rusoj en la Esperanta poezio.→Vergara, José Antonio (red.), *Internacia Kongresa Universitato (IKU), 68-a Sesio*. Lillo, Francio, 25 julio – 1 aŭgusto 2015. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 75-80.

Brosch, Cyril (2014): Relacja z konferencji interlingwistycznej „GIL–Jahrestagung 2014”.→*Language. Communication. Information* (UAM, Poznań), Vol. IX (2014), p. 170-172. (Elŝutebla kiel PDF-dosiero: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-ix,13).

- Brosch, Cyril (2015): La hitita lingvo: Ĉu “filino” aŭ „fratino“ de la prahindeŭropa? → Vergara, José Antonio (red.), *Internacia Kongresa Universitato (IKU), 68-a Sesio*. Lillo, Francio, 25 julio – 1 aŭgusto 2015. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 83-102
- Buijnsters, Piet (2014): Tekstkontroliloj por Esperantotekstoj. → Novotničková, Katarína (2015, red.): *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. (Resumoj en la angla, slovaka kaj Esperanto). Partizánske: ESPERO, p. 99-104.
- Bujdosó, Iván (2015): Az eszperantóul beszélők számának változása. (La ŝanĝiĝo de la nombro de la Esperante parolantaj [hungaroj]). → Folmeg, Márta / Jóri, Anita (red.): *Világ és nyelv szenvedéllyel. Köszöntő kötet Gecső Tamás 60. születésnapjára*. Budapest: Tinta Kiadó, p. 118-121.
- Charters, Duncan (2015): The teaching and learning of Esperanto. → *Interdisciplinary Description of Complex Systems*. (INDECS), vol. 13 (2015), issue 2: special issue: The phenomenon of Esperanto, p. 288-298.
PDF-dosieroj: http://indecs.eu/index.php?s=13_2&y=2015
- Cherpillod, André (2015): *Les Outils grammaticaux du français*. Courgenard: La Blanchetière, 43 p.
- Csiszar, Zsuzsanna (2015): La lingvaĵo de porinfana literaturo. → Lipari, Michela/ Tonkin, Humphrey (eld.), *Interlingvo inter lingvoj. Prilingvaj eseoj*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 145-153.
- Dankova, Natalia (2015): Future participles in the writings of Zamenhof. → *Esperantologio-Esperanto Studies* (EES), Kajero/Issue 7 (2015), p. 61-72.
- Dasgupta, Probal (2015): *Postkuri ne estas kuri post*: Esperanto kaj plenvorta morfologio. → Kiselman, Christer/Vergara, José Antonio (2015, red.), *De esperanta korpuso ĝis islanda lingvopolitiko*. Rotterdam: UEA, p. 19-33.
- Dias Pita, Luiz Fernando (2015): Komparo inter la esperanta kaj brazila literaturoj dum la jaroj 1950-1980. → *Beletra Almanako*, N-ro 23 (Junio 2015), 9-a jaro. p. 107-121.
- Dimov, Emil (2015): *Sinonima vortaro de Esperanto*. Varna: Grafik, 328 p.
- Farris, Michael (2014): The psychological economy of the English language industry. → *Language. Communication. Information* (UAM, Poznań), Vol. IX (2014), p. 27-36. (Elŝutebla kiel PDF-dosiero: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-ix,13).
